


66⁽⁸⁴⁾

ISSN 0150-5823



Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista
 Unu numero : 5 FF. Unujara abono kun adresaro : 28 FF
 Ĝiri al la poŝtkonta numero 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto :
 Cercle amical esp. agonais, F 47340 Laroque Timbaut

VALO :

BLAZIO PASKALO

stranga homo...

Kiam mi estis 13-jara, mi kovis la projekton esperantigi la "Pensojn" de PASKALO. Kompreneble tiu intenco ne efektiviĝis. La tasko estis multe tro supera al mia kapablo - sed tiu aĝo estas senduba, sentima, senkompleksa.

Lastatempe, 72 jarojn poste, mi relegis la Pensojn. Tiu legado tiel kaptis min, ke mi re-
 prenis la planitan ideon, en pli modesta formo. Mi tradukis nur elektitajn ekstraktojn, flankelasantate la teologiajn kaj la pure filozofiajn temojn, pri kiuj mi estas nekompetenta. Restis multaj fragmentoj de ĝenerala intereso, kiuj ŝajnis al mi tradukindaj. Malfacila tasko, kiun eble mi ne kontentige plenumis, sed en kiu mi trovis grandan plezuron. Ju pli oni frekventas tiun strangan homon, des pli oni trovas lin admirinda kaj simpatia, eĉ se oni ne akceptas liajn konkludojn. Ne mirige, ke li tiom interesis liberpensulon kiel Zakario Tourneur, markistojn kiel

Petro Lefebvre kaj L. Goldmann, ekzistadiston kiel J.P. Sartre estetikiston kiel Andreo Malraux.

La mallonga vivo de Blazio Paskalo (39 jaroj) estas grandlinie dividebla je tri partoj, pli-malpli intermiksitaĵoj. Kiel adoleskanto kaj junulo, li estis monduma spritulo, vizitanto de salonoj de preciozulinoj; tiam li verkis kelkajn versaĵojn de ama inspiro laŭ la gusto de la epoko. Sed jam tiam li distingigis per sciencaj laboroj, kiuj pli plene okupis la duan periodon; en malmulte da jaroj li verkis epokfarajn traktatojn pri matematiko kaj fiziko, en kiuj li faris rimarkindajn eltrovojn. Li inventis kaj konstruis "aritmetikan maŝinon", praulon de la modernaj komputiloj, kaj aliajn instrumentojn. Pensante pri socia progreso, li antaŭplanis malmultekostajn komuntransportilojn, similajn al modernaj busoj. En sia scienca aktiveco li estis tre moderna; inter la unuaj li anstataŭigis la skolastikan rezonadon pri abstraktaj nocioj per observado de faktoj kaj eksperimentado. Li diris: "hipotezo rigardata kiel vera, se ĝin kontraŭdiras unu eksperimento, estas falsa". Tiel, du jarcentojn antaŭ Klaŭdo Bernardo, li anoncis la fruktodonan eksperimentan metodon en sciencoj. Kaj preskaŭ tri jarcentojn antaŭ Henriko Poincaré, li difinis la fekundan kaj limigitan rolon de hipotezo en sciencoj.


Poste, malsana, multe meditante pri la homa kondiĉaro, li konvertigis al la kristana religio (en kiu li estis edukita ekde la infaneco) kaj al ties jansenista sekto. Tiu periodo daŭris naŭ jarojn, ĝis lia morto. Ĝi estas tiu de la "Leteroj al Provincano", pamfleto kontraŭ la Jezuitoj, kaj de la "Pensoj", notoj destinitaj al Apologio de la kristana religio, por kies verkado mankis al li la necesa tempo.

Tiuj du verkoj, el kiuj la lasta do restis nefinita, pro sia stilo estas rigardataj kiel majstroverkoj de la franca literaturo.

Paskalo multe legis kaj relegis la Manlibron de Epikteto kaj la Eseojn de Monteno. Li admiris tiujn du grandajn pensulojn, sed iliaj pensoj ne kontentigis lin. Epikteto, la greka stoikisto, emfazis la grandecon kaj la forton de la homa volo, kapabla fari el li kvazaŭ dion. Monteno, dubanta pri ĉio, eĉ pri la dubo (li ne diris: "mi scias nenion", sed "kion mi scias?") montris la malgrandecon kaj la malforton de la homo, kiuj faras lin simila al bestoj. La Paskala dialektiko kunigas tiujn do interkontraŭajn karakterojn. Nek dio nek pura animalo, nek anĝelo nek besto, la homo estas dunatura estaĵo. Nekapabla ĉerpi la veron el sia propra fonto, li povas trovi ĝin nur en la evangelioj. Tiel la genia scienculo finiĝis kiel mistika kredanto.

Mi estus kontenta se, malgraŭ la malperfekteco de mia traduko, la esperantistaj legontoj trovas en ĝia legado tiom da intelekta kaj estetika ĝuo, kiom mi en ĝia skribado.

Nia debato per ĉenleteroj:



TRANSKURTENA PACISMO

(aludo pri la "fera kurteno", t.e. la limo inter Okcidenta kaj Orienta Eŭropo)

Tiun debaton mi, Jakelino, volas enkonduki, ne per teksto mia, sed per traduko de alvoko de la pola

"komitato por socia defendo" publikigita en majo 1983. Mi esperantigis ĝin, ne laŭ la pola originalo (mi ĝin ne havas, kaj ankaŭ ne povus lingve kompreni), sed laŭ la franca traduko menciita en la dosiero n-ro 9 de "Avis de recherche" dediĉita al "pacismo kaj orienteŭropaj landoj". Tiu dosiero mencias ke al tiu alvoko de KOS venis respondoj de la Unuiĝo Pacista de Francio, kaj de CODENE (movado kontraŭnuklea). Mi ne havas tiujn respondojn, sed ilin volonte legus, se mi ilin havus.

"Al ĉiuj partoprenantoj kaj simpatiantoj de la pacistaj kaj kontraŭnukleaj movadoj de la landoj de Okcidenta Eŭropo:

La monda paco estas minacata. La minaco ŝvebas super ĉiuj loĝantoj de nia planedo. La senkontrola vetarmado estas atenco kontraŭ la intereso de la popoloj, senkonsidere de ilia geografia situo. Ĝi minacas vin loĝantojn de Okcidenta Eŭropo kaj nin loĝantojn de Orienta Eŭropo.

Kun grandaj estimo kaj komprenemo ni konsideras viajn protestojn kontraŭ la kreskanta frenezeco de la vetarmado kaj kontraŭ la monda disvolvado de la nuklea potenco. Ni konsideras viajn protestojn kiel defendon de la fundamentaj rajtoj de homo - la rajto vivi.

Kiel vi, ni estas konvinkitaj, ke milito povas alporti sur nian teron nur morton kaj detruon. Kiel vi, ni diras "ne" al la vetarmado. Ni konscias, ke la disvolvado de la nuklea potenco ambaŭflanke de la limo, kiu disigas ambaŭ grandajn militistajn blokojn, enhavas por ni ĉiuj danĝeron kun nekalkuleblaj konsekvencoj. Tamen ni konsideras, ke la protestado kontraŭ la militdanĝero povos esti efika nur, kiam ĝi estos komuna farado de ĉiuj popoloj ambaŭflanke de la limo, kiu disigas ambaŭ blokojn, kaj kiam ĝi baziĝos sur komuna postularo. Ni konsideras, ke la postulo, ke estu haltigata la disvolvado de la defendosistemo de la landoj de NATO, sen ke paralele estu postulata la redukto de la militpotenco de la Varsovia Pakto, ne servas pacon.

Viaj protestoj kontraŭ la vetarmado estas misuzataj.

La ekspansiema politiko de Sovetio baziĝas sur militĉantaĝo kaj sur agresema propagando, kiu neniel zorgas pri realoj. Cetere, en siaj politikaj agadoj, la totalismaj sistemoj ĉiam sin turnis al tia ĉantaĝo.

Ni poloj, same kiel afganoj, ĉeĥoj, hungaroj, kaj aliaj nacioj submetitaj al Sovetio, estas viktimoj de tiu ĉantaĝo. La militpotenco de la Varsovia Pakto estas konstruata koste de kreskanta mizero kaj subpremado de milionoj da homoj vivantaj en Sovetio kaj en la landoj de la "reala socialismo". La programo por la disvolvado de la militpotenco povas realiĝi nur en la landoj submetitaj al tiu reĝimo kvazaŭ sen praktikaj limoj, ĉar tie ne ekzistas institucioj, kiuj povus praktiki socialan kontrolon. La graveco de la rimedoj dediĉataj al armado neniam estas publike konata. La tuta ekonomio, kies mastrumado estas centrigita, senlime servas la disvolvadon de la militpotenco.

Totalismo karakteriziĝas per mensoga kaj agresema propagando, disvolvata per malestimo al la publika opinio. Dank'al tiu propagando, kiu povas permesi al si mem ignoradon de la faktoj, la imperiismaj projektoj realiĝas nome de la "porpaca batalo" kaj de la "lukto por liberigi la subprematajn popolojn". Tiuj frapvortoj ebligas kaŝi agojn, kiuj celas nur subpremadon. Por ni, milito antaŭvidigas ne nur detruon, sed ankaŭ morton en la vicoj de armeo, kiu luktus por la realigado de imperiismaj celoj, kiuj estas celoj, ne de ni, sed de totalisma sistemo. (...) La pacista movado, kiu postulas la redukton de la militpotenco de la Varsovia Pakto, estas konsiderata de la leĝaro de la landoj en la orienta bloko kiel perfido, kaj estas punebla per longa restado en malliberejo. Ni rajtas nur "lukti por la paco", postulante la senarmiligadon de niaj "kontraŭantoj". Tio malpermesas al ni disvolvi en la komunismaj landoj justan agadon por la porpaca lukto. Tamen ni malgraŭ ĉio disvolvos tiajn agadojn.

Ni do sendas al vi tiun alvokon, por ke, en viaj manifestacioj kontraŭ la instalado en Okcidenta Eŭropo de la raketoj Pershing kaj Cruise, vi petu ankaŭ la redukton de la militpotenco de la Varsovia Pakto, notinde la malaperigon de la raketoj SS 20 direktataj al viaj urboj.

Ni esperas, ke ni povos kalkuli kun via sinteno en nia kaŝa lukto kontraŭ la totalisma subpremado, kiu nuntempe estas la ĉefa minaco al la monda paco. La pacistan movadon naskis la morala protesto kontraŭ subpremado, tial ĝi ne povas

plenumi sian rolon, se ĝin misuzas por propagandaj celoj tiuj, kies povo baziĝas esence sur subpremado.

Viaj postuloj estas niaj, ni volas pacon, ni volas vivi kun sento de sekureco, en kondiĉoj, kiuj garantiu la homrajtojn kaj la fundamentajn civitanajn rajtojn.

Por ke la mondo, en kiu ni vivas, fariĝu pli homeca, ni devas unuigi niajn klopodojn. La internacia solidareco de ĉiuj, kiuj volas vivi en paca mondo, devas esprimiĝi per komunaj agadoj kontraŭ ĉiuj agoj de violenteco, ĉantaĝo kaj arbitro farataj en la mondo.

Ni atendas vian respondon, kiu povus esti deirpunkto por niaj estontaj komunaj agadoj por defendi la pacon.

Komitet Oporu Społecznego"

J.C. PICQUET :

KONTRAŬ ĈIUJ BLOKOJ

Ĉio, kio estas entenata en tiu teksto certe povas trovi aprobon ĉi tie. La pacemaj sentoj estas tre disvastigitaj en multaj landoj.

Estas granda ĝojo scii, ke en orient-eŭropaj landoj ekzistas homoj, kiuj havas pri tiu temo vidpunkton ne ligitan al kompartio kaj kiuj estas klarvidaj pri la problemo.

La prezentitaj argumentoj kontraŭ ĉiuj blokoj estas ege pli interesaj ol tiuj de kutimaj okcidentaj pacistoj.

La analizoj pri tiu problemo plej disvastigitaj en la okcidentaj landoj estas tiuj, kiuj denuncadas usonajn vetarmilojn. Ĉe ni, la pacistaj movadoj denuncadas pli forte la usonan blokon kaj kruiŝe-misilojn ol ĉiujn vetarmilojn. Certe tia teksto ne plaĉos al ĉiuj, laŭ tiu vidpunkto. Kutime ĉi tie oni kriaĉas "prefere esti ruĝa ol morta".

La pozicio de tiuj, kiuj denuncadas ĉiujn blokojn, ne estas bone komprenata. Oni akuzas ilin, ke ili volas resti sub usona premo. Tute ne !

Ili ne fidus al usona bloko. Por bone kompreni tiun vidpunkton oni ne devas forgesi tion, kio gvidas eksteran politikon de grandaj ŝtatoj, Usono kiel USSR.

Ŝtatoj defendas sin mem, nure ; kaj la konsekvencoj de tio estas malsimilaj laŭ kie oni elparolas. Eŭropo estas teatro de alfrontiĝo de Usono kaj USSR. La premo, farita ekzemple de Usono sur eŭropaj ŝtatoj, havas tiun celon. Sed la ŝtatoj havas tamen etan liberecon, se ili ne tuŝas al usonaj vetarmiloj. En Francio, Usono lasis la socialistan registaron akcepti komunistojn, ĉar ili promesis ne lukti kontraŭ

usonaj vetarmiloj.

Sed se oni aludas pri Centra Ameriko, Usono ne volas lasi an ajn liberecon al ŝtatoj kontraŭ sian politikon, ĉar ili estas tro proksimaj de ĝi.

USSR havas samtipan politikon al siaj vasalaj ŝtatoj.

Lukti kontraŭ ĉiuj blokoj estas unue kompreni tion. Kaj nur grupigitaj ŝtatoj, kiuj havus komunajn celojn, povus trovi, en tiu strategia ludo, muso-truon por spiri pli libere rilate al vetarmiloj.

Bedaŭrinde ni ne estas je tiu punkto en Eŭropo aŭ ie ajn. Popoloj devas tamen montri la vojon.

Tiu elmonro havos estontecon, nur se ĝi estas, analize, honesta kaj klarvida. Mi esperas, ke ĉi tiuj frazoj povus helpi tiujn, kiuj ne volas ludi kun la fajro.

La teksto prezentita de Jakelino eniras tiun vojon.

Jean-Claude : Por trakti tiun temon mi ne kompetentas. Tamen ŝajnas al mi, ke jam nura tramonda korespondado inter simplaj civitanoj kiel ni, estas grava fakto.

Tiel oni povas vidi, ke la "malamiko" estas homo kiel ni kaj ke la vera danĝero estas ignorado kun sektemo kaj rezdeziro, kiujn ĝi estigas.

Suzanne : Jes ja, ĉiu ajn popolo malamegas la militon, ĉar la popolanoj estas la ĉiamaj viktimoj. Tion la regantoj bone scias. Tial, per misinformado, ĉantaĝoj, ili erarigas la plejmulton el la homaro, celante facile instigi kaj trudi siajn regatojn interbuĉiĝi, kiam ili opinios tion nepra, pro profitoj aŭ potenco, kiuj tute ne koncernas la popolbatalantojn. Dum la milito 1914/18, kiam la batalantoj interfratiĝis (tio fakte okazis!), tuj oni ŝanĝis la homojn en tiu sektoro. La regantoj spertas la bonefikon de frateco, pro tio ili konscias la danĝeron de popolfrateco. Jen kial ili bremsas la disvastigon de Esperanto, kiu fakte estas la nura rimedo por popolinterfratiĝo monda, kiam la popolanoj mem zorgus la homsocion. Kiam oni atente interesiĝas pri la homsocio, la socia vivo, la socia demando, oni konstatas, ke la plejmulto ne kulturas la kritikemon kaj blinde kredas la cerboŝtopaĵojn.

Plia konstato : la mondregantoj tre bone interkonsentas ; ilia oficiala malkonkordo estas nur por ŝtopado de la popolerboj. Antaŭ nelonge mi legis pri tio ĉi-suba, kiu ege reliefigas kion mi ĵus diris.

Versajne vi ĉiuj memoras pri tiu spiona afero Boeing 747 de la kompanio South Korean Airlines, flugado 007, kiu ekflugis

de Anchorage por iri al Seulo, kaj kiu intence devojiĝis longdaŭre ĝis 500 kilometroj okcidenten de la vojo elektita per internacia interkonsento, kaj tion faris plurfoje. Por tia ampleksa agado oni uzis : sateliton, spacialan raketon, du aviadilojn (unu ŝajnigis pasaĝeran aviadilon sed estis konvene ekipita per spion-aparatoj ; la dua, milita, sekvis samajn vojon, altecon, rapidecon por konfuzi la sovetiajn radarojn). Tia aĉa kombinaĵo! (La potencoj maraj, teraj, aeraj kaj spacialaj konstante interrilatis). Do pro tia konfuzo la sovetianoj kelkajn minutojn hezitis interveni, ĉar ili sin demandis, ĉu la aviadilo estas pasaĝera aŭ ne. Tio ebligis al la usonanoj plenumi sian mision.

Jam du jaroj pasis, ankoraŭ ne eblas koni la tutan liston de la pasaĝeroj... mankas kelkdekoj da nomoj. Kial ? Same, kial tia silento, tia komplaceco fare de sovetiaj aŭtoritatoj ? Kiam ili facile evidentigus tiajn faktojn, la verecon, kaj per tio provokus, okazigus diplomatan krizon, kaj igus vanaj kaj ridindaj la argumentojn de Reagan pri la limigo de la vetarmado. Kial tia silento de la usona registaro ? Ŝajnas, ke sekreta interkonsento okazis. Kompense de ignorado fare de Moskvo, Usono konsentis 1) ĉesigi tian spionadon, 2) senigi la spacialan raketon de ĝia armilekipo. Negocaj aferoj estas severaj kaj la spaciala raketo estis interŝanĝ-mono. Jen kial la sovetianoj malpliigis sian egan prokraston en la spaciala defendo. En tiaj aferoj la 269 senkulpaĵ civiluloj mortigitaj estas malgravaĵo.

Mi forgesis substreki, ke pacifisto denuncas ĉiajn armilojn, ĉian militon. Ankaŭ ĉe ni same oni subpremas la soldatrifuzantojn kaj tiujn, kiuj klopodas por la pliboniĝo de la homaro.

Nicole D. : Jen informoj el la revuo "Non-Violence Politique", n°87 (dec.85), kiuj povas utili al niaj interŝanĝoj, pripensoj pri la temo elektita de Jakelino :

Estas la decido de NATO en 1983, starigi pli da raketoj en Eŭropo, kiu instigis interesiĝon kaj partoprenon en la grava debato pri "Milito kaj Pacismo" en Pollando.

En julio 1984, okaze de Eŭropa Konvencio de Pacistaj movadoj en Perouse, "KOS" subskribis kun la franca CODENE kaj la "Lega per l'Ambiente" (italaj ekologiistoj) tekston asertantan, ke "Paco kaj libereco estas nedisigeblaj".

En 1985, en Krakovio naskiĝis "Paco kaj Libereco", kiu estas vera civila rezistado neperforta, subtenanta militrifuzantojn.

En tiu numero estas de G. Boubault artikolo, kies titolo

la homaj karakteroj, kiel fiero, ambicio, avido, k.m.a. kaj manifestiĝas en la socio per, i.a., naciismo kaj imperialismo, en tiuj imperialismoj, kie greftiĝas la komunaj interesoj de la nacioj, ekzemple la ekonomiaj oligarkioj, k.s.

Oni tre facile povas doni respondon, kiu povus esti deirpunkto por komunaj agadoj, por ne nur defendi sed atingi la pacon. Tiu respondo same estas aplikebla al ĉiuj t.n. porpacaj movadoj, kiel "Komitet Oporu Społecznego" KOS, CODENE kaj aliaj. Ni tute simple ne nur rifuzu la kultojn al naciismo, malfermante nian menson al tutmonda, sennacieca pensmaniero, ni ne nur rifuzu partopreni la militservojn, sed ankaŭ rifuzu fabriki la armilojn, la kanonojn, la bombojn ; ni rifuzu pagi impostojn por la ŝtata monstro, ni rifuzu doni niajn voĉojn al la hipokritaj politikuloj, kiuj trompas nin en la sistemoj. Ni postulu la detruon, kaj mem detruu la ferajn kurtenojn kaj ĉiujn interhomajn barilojn. Ni postulu de Korbačov kaj Reagan, ke anstataŭ hipokritan porpacan mesaĝon en la Novjaro, ili en komuna, sennacieca lingvo kiel Esperanto, dekretu definitivan malpermeson por fabrikado de ĉiuspecaj armiloj, ke ili abolicu ĉiujn nacilimojn, ĉiujn ekonomiajn monopolojn, ĉiujn politikajn subpremojn kaj permesu, ke ĉiuj homoj povu libere cirkuladi sur la tuta tero, sendepende de raso, religio, kutimoj, moroj, k.s.

Ne estas alia solvo, ĉio plia apartenas al homa hipokrita sinteno kaj la vorto pacismo restas ĉantaĝa vorto, kaj mi persone kompatas la sincerajn homojn, kiuj promene manifestacias sur la stratoj kun banderoloj en la mano, kaj kiuj kredas al tiu simpla, hipokrita vorto : Paco.

J.G. : En la kadro de la dispartigo de la mondo en du antagonistaj blokoj la minaco de nuklea milito estas uzata kiel rimedo por firmigi la superregadon de la potencegoj.

Usono "protektas" la landojn de la t.n. "libera mondo", kie tamen estas aĉaj diktaturoj (kiel en Suda Ameriko kaj en Sudokcidenta Azio), kondiĉe ke ĝi akceptu la ekonomian superregadon de la dolaro, kiu mastras la merkaton de la varoj.

En la orientaj landoj Sovetio "protektas" la landojn de la Varsovia Pakto per misiloj SS 20, kondiĉe ke ili akceptu, ke Ruĝa Armeo restadu en la landoj por organizi tiun defendon, sed fakte por interveni kontraŭ la ribelemaj popoloj, kiam bezone, kiel tio jam okazis en Hungario, Ĉeĥoslovakio.

La nuklea minaco estas la ĝendarmo de la Mondo.

La vetarmado estas nepre necesa al la funkciado de la

sistemo. La konferencoj pri malarmado estas burleskaĵoj, kie la "granduloj" babilas senfine, batalas per ciferoj... Dume, ili disvendas armilojn en la okcidenta bloko por subteni koruptitajn kastojn permesantajn la superregadon de la transnaciaj trustoj kaj en la orienta bloko por protekti marksism-leninismajn registarojn. Tion oni vidas ĉie en la Tria Mondo : gravajn armeojn kaj malsaton de la popoloj.

En Nederlando kaj RFG okazis gravaj manifestacioj kontraŭ la instaladon de "Pershing" en la lando, sed la registaroj ĝin tamen faris. En Francio je la alvoko de CODENE (Sendependa pacista movado) okazis manifestacio kontraŭ la neŭtrona bombo, kiu mortigas la homojn sen damaĝi la materialon. Malmulte da personoj partoprenis kaj la franca Prezidento Mitterrand deklaris : "Estas mi, kiu estas la nura decidento pri la nuklea bombo!".

Fakte, la registaroj decidas ofte kontraŭ la volo de la popoloj. Sendube oni devas batali kontraŭ ĉiuj nukleaj armiloj: Pershing, SS 20 kaj la venontaj, sed kiamaniere ? Niaj landoj estas en NATO sub dependo de Usono kaj la orientaj landoj en la Varsovia Pakto sub dependo de Sovetio. Kion fari ekster tiu disigo, sekvo de la dua mondmilito ?

Ĝiz el Lamark : Pri ĉi tiu problemo mi havas kelkajn hezit-ojn. Mi ne scias, ĉu la transkurtena pacismo estas reala aŭ fikcia, ĉu vere ne temas pri "frapvortoj" naive kredataj far' de la popolo dum la registaroj pensas (tute) male. Cetere, la sama problemo prezentigas ankaŭ en nia landa pacismo. Kio gravas ? Se oni volas krei la pacon, oni povas tamen "militi" en pacisma organizo, sed resti kun okuloj bone malfermitaj kaj ne igi sin pupoj de iu ajn.

Ĵanseb :

La MUREGO

Armado estas kiel murego, kiun oni konstruas de malsupre. Estas homoj ambaŭflanke, kiuj aldonas ŝtonojn. Je la komenco estis nur mureto, kiel inter du kamparaj domoj. Poste, ĝi kreskis pli kaj pli kaj oni rimarkis, ke ĝi riskas fali. Ĉiuj deziris, ke, se tio okazos, ĝi falu en la alian flankon. Tial ili aldonis ŝtonojn, ĉiu en sia flanko.

Iuj rimarkis, ke la murego iĝis danĝera, ke necesas haltigi la konstruadon. Ili provis konvinki homojn ĉirkaŭ si kaj iuj eĉ ĉesis aldoni ŝtonojn kaj eĉ formetis ilin. Sed, ĉar ili faris tion nur unuflanke, tio estis ankoraŭ pli danĝera. Kaj oni malpermesis al ili plu fari.

Ili tiam havis la ideon fari ĝin samtempe en ambaŭ flankoj. Sed necesis organizado, estraro, estroj... Sed la plejparto el ili, pro sia inklino, ne ŝatis tion. Ili preferis agi en sia angulo, de tempo al tempo, sen unueco, movante danĝere la muron. Oni metis ilin en karceron, kiam ili minacis iĝi tro multnombraj kaj faligi la muron...

Ili devis do konvinki tiujn, kiuj organizis la konstruadon de la muro, interkonsenti por ordoni samtempan detruadon, ŝtonon post ŝtono, ambaŭflanke de la muro. Estis malfacile, ĉar tiuj, kiuj proponis sin por tiu tasko, kredegis, ke la aliflankuloj volas faligi la muron sur ilin, kaj el tiu kredo ili ĉerpis la necesan energion por plenumi malagrablan taskon kiel murkonstruadon...

Intertempe la muro daŭre kreskis...

Kaj daŭre kreskas...

 Venonta debato: "La povo de la amaskomunikiloj". Estas jam bonvena enkonduko por la posta debato. Antaŭdankon!

Laŭ komuniko de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo:

Unuafoje franca ŝtat-organizaĵo uzas Esp-on en oficiala eldonado. Temas pri "Répertoire des Produits Industriels de la Meuse" (Adresaro de la industriaj entreprenoj en departemento Mozo, Francio). Tiu bela, 96-paĝa dokumento, en A3-formato, enhavas komence indekson kvarlingvan (F, A, G kaj Esp-o) de ĉiuj industriaj produktoj fabrikataj en Mozo. Sekvas 195 adresoj alfabete listigitaj. Tiu iniciato aspektas ege grava por la disvastiĝado de la internacia lingvo, specife sur la tereno de la komercaj interŝanĝoj. Ĉiu interesato povas ricevi unu ekzempleron kontraŭ sendo de 10 irpk-oj al jena adreso:
 CHAMBRE de COMMERCE de la MEUSE, Parc Bradfer, F 55000 BAR LE DUC.

De la 27a de julio ĝis la 2a de aŭgusto okazos en EJEJA de los Caballeros (Hispanio) la **3a Internacia Junulara Renkontiĝo**. Aranĝita de SAT-Junulfako, J.E.S.A. kaj kultura Komisio de la Urbeŝtaro de Ejeja.

Aliĝkotiĝo: 500 pesetoj (al Caja de Ahorros de la Inmaculada Urb. 4, c/d Jaime 10, E-50001 Zaragoza; Konto: 72724-30 de J.A. Fleta).

El la programo: Interkona vespero (27/7), Kursoj de Esp-o, Banoj kaj vizito al la urbo (28/7), Vizito de Zaragoza (29/7), Debatoj, Folkloro muziko "La Jota" (30/7), Vizito al "Las Cinco Villas" (31/7), Vizito al Bolaso, Debatoj kaj fermo de la Renkontiĝo (1/8).

Pliajn detalojn petu de: José Antonio FLETA, S. Teresa 20-7, E-50006 ZARAGOZA (Hispanio)



KONTRASTOJ

La riĉeco de la riĉuloj estas tiel skandala kiel la mizero de la malriĉuloj. Elio Wiesel

La malprosperajn landojn karakterizas granda diferenco inter la vivrimedoj de la homoj: tie la granduloj estas tre riĉaj, kaj la popolo tre mizera. Male, en prosperaj landoj kiel Svedio, la ĝenerala riĉeco estas pli egale partigita.

Francio iam estis sufiĉe prospera lando. Ŝajne ĝi nun glitas al malprospero. En la daŭro de kelkaj monatoj la posedantoj de akcioj vidis la valoron de sia havaĵo duobliĝi; samtempe kreskis sur niaj trotuaroj la nombro de almozuloj. Al tiuj ĉi mi ĉiam donas iom da mono, kun bedaŭro, ke mi ne povas pli efike ilin helpi. Verŝajne kelkaj el ili estas mallaboremaj parazitaj, sed certe ne ĉiuj, certe ne multaj. Unu el ili, sufiĉe fortika junulo, montris kartonplaton kun jena surskribo:

Sen laboro, sen vivrimedoj

Akceptus kian ajn laboron.

Iuj pasantoj donas al li kelkajn monerojn. Neniu proponas al li la deziratan ajnan laboron. Kiam mi rakontis tion al mia edzino, ŝi havis larmojn en la okulojn. Kaj mi, kiam mi legis tiun surskribon, revenante de la urba bazar, mi iom hontis pri mia korbo plena de aĉetitaj varoj. Kiom do devus honti tiuj riĉuloj, kiuj en luksaj restoracioj elspezas dekmilojn, eĉ iafoje centmilojn da frankoj por unu manĝo!

Jes, en unu sama lando, ofte en unu sama urbo, skandala estas tiu kontrasto inter riĉeco kaj mizero. Kaj se ni plivastigas nian rigardon al la tuta planedo, kia skandalo, ke ni ĉiutage sate manĝas, kaj ke pro ekonomiaj motivoj oni detruas kvantojn da nutraĵoj, dum ie homoj kaj infanoj laŭvorte mortas pro malsato! Ni, okcidentanoj de la finiĝanta XX-a jarcento, ja rajtas esti fieraj pri nia civilizacio, pri nia kulturo! Kiom da malsatuloj ni povus kuraci per la mono, kiun ni fuŝdediĉas al niaj luksaj "bezonoj", per la senlimaj sumoj englutataj en la fabrikado de pli kaj pli perfektaj amasmortigiloj!

Murdo de samlandano estas krimo, sed murdo de civitano de alia nacio en milito estas ago de heroa virto.

Martin Luther King

Milito estas masakro inter homoj, kiuj ne konas sin reciproke, profite al homoj, kiuj reciproke sin konas, sed ne sin masakras.

Paul Valéry

Bela metio, tiu de militisto : bruligi domojn, prirabi preĝejojn, perforti virinojn, senhavigi malfeliĉulojn, masakri senkulpulojn ! Neniu paco, eĉ maljusta, ne estas preferinda al la plej justa milito.

Erasmus

La plej fia perforto estas tiu, kiu laŭlegiĝas kaj daŭrigas la superregojn, la subpremojn kaj la ekspluatadojn, tiu, kiu premegas milionojn da homoj.

Dom Helder Camara

DU NOVAĴOJ

Unu privata, unu publika.

La unua venis de miaj gefiloj : juna amikino de ili mortis 20-jara.

"Ho ve! kiom da junulinoj mi vidis morti!" ploris romantika poeto. En lia tempo ili mortis pro "langvoro", fakte plejofte pro ftizo. Nun tiu malsano estas venkita, la modo ŝanĝiĝis, ili mortas pro leŭkemio.

Kiam belaj junaj vivoj estas tiel falĉitaj ; kiam en la mondo tiom da infanoj mortas pro malsato, dum ni maljunuloj trenas tro longan pezan ekzistadon - ĉu eblas diri, ke la Naturo (aŭ ĝia "Aŭtoro", "ĉiopova Kreinto") estas justa, bona, bela ?

La dua novaĵo estas diskonigita de gazetoj : francaj industriistoj, kun aŭ sen konsento de la registaro, liveris kanonojn kaj grandan kvanton da obuzoj al la irana armeo ; dume aliaj francaj industriistoj liveradas militajn aviadilojn al la iraka armeo. Tiel niaj fabrikistoj de armiloj provizas senprefere la du intermilitantajn regnojn per efikaj amasmortigiloj, kaj helpas tiujn du popolojn por interbuĉado, kiu daŭras jam kvar jarojn. Ambaŭflanke falis centmiloj, kaj tio ne estas finita.

*Al tiuj sinjoroj, de kies ajn mano, mono estas ĉiam bonvena. **Business is business** (Komerco estas komerco, angla proverbo). Kaj francaj laboristoj, por vivteni sin per necesa salajro, estas objektivaj komplicoj en tiu malglorinda afero.*

La unua novaĵo memorigas min pri vortoj de Han Riner :

"Ne pli ekzistas kosmo ol Dio. Neniu saĝo, neniu bono ekster la koro de la homo. La universo estas vakua ; kaj la ĉielo, kiel la belo, estas kreaĵo de niaj okuloj".

La dua novaĵo igas min opini, ke Han Riner estis optimista koncerne la saĝecon kaj la bonecon de la homa koro. La universo estas kruela, kaj la homo "kreita laŭ bildo de la Kreinto", estas same kruelega kaj senkora.

VALO

ANALIZA GRAMATIKO (10)

La refleksivo (B)

"La refleksivo rilatas nur al la subjekto de tria persono en la sama frazo", skribis Zamenhof en la Fundamento ; sed lia supera lingva intuicio faris ke multfoje lia uzo ne alĝustigis al tiu ĉi principo. Tamen, gvidate nur de la intuicio kaj ne esplorinte la motivojn, li ne povis en la praktiko atingi tute koheran uzadon, kiu povus klare gvidi nin. Sed la motivoj decidaj ekzistas ĉiam en ĉiuj partoj de la Esperanta gramatiko, kaj ĝenerale tiuj, kiuj vualigas per mistero, troviĝas en la elipsoj, en la pretersilentitaj vortoj, kiel ni vidis en la ekzemploj de la unua parto.

La kaŭzo, pro kiu oni devas multfoje ne uzi refleksivon rilate al la subjekto, estas la elipso de la verbo esti antaŭ la kvalifikoj, kie ĝi troviĝas ĉiam implicite aŭ eksplicite, ĉar ĉiu esprimo de eco signifas, ke la kvalifikata afero aŭ persono estas tia. La signifo de "samideano advokato" kaj de "floro ruĝa" estas "samideano, kiu estas advokato" kaj "floro, kiu estas ruĝa". Gravas memori, ke la est-nocio troviĝas ankaŭ en ĉiuj verboj, ĉar kiu manĝas, tiu estas manĝanta, kaj kiu kuras, tiu estas kuranta.

REGULKOMPLETIGO.

Al la Fundamenta difino estas necese aldoni : "Refleksivo estas uzebla en la kazoj akuzativo kaj prepozitivo, ne en nominativo, kaj ĝi neniam povas esti subjekto, escepte kiel apozicio. Ekzemple : La pronomo **si** ; la refleksivo **sia**."

Kiam posesivo troviĝas en frazero kvalifikanta substantivon, kiu situas post la subjekto, ĉar en tiaj kvalifikoj ĉiam estas elipsa subkompreno de la kopula verbo esti, sence formanta apartan propozicion, kies subjekto estas la kvalifikata substantivo, la refleksivo - en konformeco kun la Fundamenta regulo - povas rilati nur al ĉi tiu dua subjekto. Malofte estas necese uzi refleksivon rilate al ĝi, sed neniam oni povas uzi

ĝin rilate al la ŝajne sola subjekto de la frazo, al tiu, kiu klare montriĝas.

Tial frazeroj respondas ĉiam al iu el la pronomaj demandoj **kia estas?, kio estas?, kiu estas?, aŭ kies estas?**, ne al la adverbaj **kial, kiel, kie, kiam, kiom, sur kio, kun kiu, en kiu, k.c.**

En konformeco kun la antaŭa regulo, en 9 sintaksaj funkcioj ne estas uzebla refleksivo rilate al la videbla subjekto :

1-a Funkcio : - GENITIVO.

Post la prepozicioj **de** aŭ **el** de genitivo neniam uzeblas la refleksivo SIA rilate al la propozicia subjekto, ĉar genitivo, adjektiva, ĉiam havas la signifon "kiu estas de aŭ el".

Ekzemploj :

- Jozef ekvidis sian fraton Benjamen, la filon de lia patrino(Z). (La demando estas : "Kies estis filo B.?", kaj la respondo, "Benjamen estis filo de lia patrino", t.e., de Jozef. "Benjamen estis filo de sia patrino", neniam direndas, ĉar estas sciante, ke ĉiu estas filo de sia patrino, kiel, sam motive, ne necesas diri, ke iu estas servisto de sia sinjoro, aŭ io proprieto de sia proprieto.

- La popolo ne turnis forte sian koron al Dio de ĝiaj patroj(Z). (La demando estas "Kies estis la Dio?")

- Ĉiu el la Izraelidoj devas resti ĉe la posedaĵo de la tribo de liaj patroj.(Z) (Kies estas la tribo?)

- Liaj filoj kaj liaj filinoj estis mangantaj kaj trinkantaj vinon en la domo de ilia unue naskita frato.(Z) (Kies estis la domo?)

- En la tria tago de lia regado li faris festenon por ĉiuj siaj princoj.(Z) (Kiu estis la tago?) Atentu, ke "por ĉiuj siaj princoj" dativa, ne havas adjektivan sencon, kiel ĝin havas genitivo.

- Ŝi renkontis sian filon kaj sian nepon, la filon de ŝia filino. (Kies estis filo la nepo? Li estis filo de ŝia filino.)

- Ŝi pagis tion per sia mono ; per mono el ŝiaj ŝparaĵoj. (Kia estis la mono?).

La sola malfacilaĵo, okaze, estas difini ĉu reale suplemento estas aŭ ne estas genitiva.

L. Mimó

NOVAĴOJ DE SAT-BROŜURSERVO :

Baldaŭ estos liverbla reeldono de la fama teksto de LANTI : "Naciismo". Estas projektita la reeldonado de la tre ŝatata "Laŭ la fluo de l' interparolo" de L. Bourgeois. Antaŭmendantoj de minimume 10 ekzempleroj ĝuas speciale rabatitan prezon.

Nia originala novelo :

Daniel LUEZ

LA DU ĜIBULOJ

Estis iam du ĝibuloj, Petro kaj Johano. Ambaŭ estis tajloroj kaj iris ĉiumatene al la laboro, ĉiu el ili aparte, al la farmdomoj kaj kasteloj de la lando.

Iun vesperon Johano revenis sola de sia laboro kaj preterpasis malnovan neloĝatan kastelon. Venis al li la ideo viziti ĝiajn ruinojn. Li eniris tra breĉo, laŭiris longan koridoron kaj penetris en kadukan ĉambregon. Li ektermis pro teruro : multegaj nigraj hometoj rondodancis tenante sin je la manoj kaj kantante. Unu el ili kantis jene :

Lundo, mardo, merkredo!...

kaj poste la aliaj kune rekantis :

Lundo, mardo, merkredo!...

kaj nenion plu.

Johano jam aŭdis pri la Noktodancantoj, sed neniam vidis ilin antaŭe. Por senĝene observi ilin, li kaŝis sin post piliero. Sed baldaŭ ili trovis lin, venigis lin en la mezon de la rondo kaj plue kantis dancante ĉirkaŭ li : **Lundo, mardo, merkredo!** Kaj ili diris al la ĝibulo : "Nu, kantu kaj dancu kun ni!". Kaj Johano dancis kaj kantis kun ili : **Lundo, mardo, merkredo!...** Ĉar la nanoj ĉiam ripetadis nur ĉi tiujn vortojn, li diris al ili : "Kaj poste? Via kanto estas ja tro mallonga!" - "Estas ĉio." - "Kial estas ĉio? Kial vi ne aldonas : "Ĵaŭdo, vendredo!" ?" - "Nu, vere!" ili ekkriis, "estas tre bele!".

Kaj ili ĝoje plukantis : **Lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo!...**

Kaj ili turniĝis kaj turniĝis kun diableca viglo. Kiam Johano, lacigita, deziris ĉesi, la nanoj demandis : "Kion ni donos al nia amiko, ĉar li plibeligis nian kanton? Kion li volos, arĝenton aŭ oron, aŭ se li preferos, ni forigos lian ĝibon." - "Ho jes" ekkriis Johano, se vi volus forpreni ĉi tiun malbelan ĝibon, kiun mi portas ekde mia naskiĝo, mi volonte lasus al vi la oron kaj la arĝenton!". - "Jes, ni forprenu lian ĝibon!". Ili frotis lian dorson per mirinda pomado, kiu tuj malaperigis la ĝibon, kaj li revenis hejmen rekta kaj eĉ kiel bela knabo.

Kiam lia amiko Petro vidis lin, li tiel miris, ke li apenaŭ rekonis lin. "Kiel?" li diris ĉirkaŭirante lin. "Kaj via ĝibo? Kie estas via ĝibo?" - "Ĝi malaperis, kiel vi mem vidas!" - "Kiel tio okazis?". Johano rakontis al li sian aventuron. "Ha, kia feliĉo!" ekkriis Petro. "Ankaŭ mi iros vidi la Noktodancantojn - kaj hodiaŭ mem!".

Dum vesperiĝo Petro iris al la malnova kastelo. Survoje li pripensis : Se mi volas, la nanoj forprenos mian ĝibon. Sed kiel tio utilis al mi? Mi plaĉos al junulino - kaj poste? Tio ne feliĉigos min! Ha, mi ja ne estas stultulo. Se la nanoj proponos al mi oron kaj arĝenton, mi akceptos! Finfine riĉeco feliĉigas. Kiam li alvenis al la ĉambrego, la nanoj estis jam dancantaj kaj kantantaj :

**Lundo, mardo, merkredo,
ĵaŭdo, vendredo!...**

"Kaj poste?" li diris.

"Poste? Estas ĉio. Ĉu vi scias ion pli?" - "Certe." - "Ho, diru ĝin, diru ĝin!"

Li aldonis : "Sabato kaj dimanĉo!"

"Ho, tio ne estas bona! Tio ne rimigiĝas! Li fuŝis nian kanton, kiu estis tiel ĉarma." Petro haltis konsternite.

"Tamen", diris unu el la nanoj, kiu ŝajnis estri la aliajn, "nia amiko agis bonintence kaj ni malprave punus lin." - "Estas vere!" ekkriis ĉiuj hometoj kune. "Nu, amiko", diris la nano, kiu unue parolis, "kion vi deziras, la belecon aŭ la riĉecon?". Ne pripensante Petro kriis : "Mi deziras tion, kion Johano lasis." Tuj la diabloj iris preni la ĝibon de Johano, kaj alkurante al Petro, ili fiksas ĝin al lia korpo per pingletoj, kiuj eniris lian karnon suferigante lin. "Aj! aj!" li vekriis. "Ĉesu, mi petegas vin! Ho, ho, ne tion mi volis!" - "Des pli malbone por vi! Kial vi ne pli bone vortigis tion?"

Vane la malfeliĉulo baraktis per ĉiuj siaj fortoj. Kiam li hejmeniris, li estis ĝibulo antaŭe kaj malantaŭe. Kaj li devis porti dum sia cetera vivo, la ĝibon de sia kamarado kaj la sian!

KIEL PROPAGANDI PRI ESPERANTO ?

Mi ricevis informilon de GROUPE D'ACTION POUR L'ESP-0 123 rue de Royan, F 16710 SAINT YRIEIX, kies agado ŝajnas gratulinda. Ekz- ĝi eldonas mallongajn flugfoliojn en diversaj lingvoj por disdoni en iu lando al eksterlandaj vizitantoj. Tiu flugfolio estas eldonita eĉ en japana kaj ĉina lingvoj. Ĉar mi devas iri baldaŭ en Bulgarijon kaj renkonti samideanojn, mi devos kompletigi tiun laboron per bulgara traduko de la informilo. **Laŭlo.** Noto de la red. : Okaze de la centa datreveno de Esp-0, G.A.E. ĵus eldonis por franclingva publiko specialan poŝtkarton dulingvan "Centjara jubileo de internacia lingvo Esperanto je servo de centjara progreso" kaj glumarkojn en la franca. Rabato por pograndaĵ mendoj. Ni rekomendas tiujn eldonaĵojn al la interesatoj.



LAŬTAJ INFORMOJ KAJ PETOJ

Sennacieca Asocio Tutmonda
67 av. Gambetta
F - 75020 PARIS

1986-03-28

PUBLIKA LETERO al UEA, ILEI, TEJO, MEM, IKUE, LIBE

Estimataj gesamideanoj,

La 27an de julio 1983, SAT ricevis leteron de POLA ESPERANTO-ASOCIO per kiu ĝi invitas nin kaj ankaŭ vin kongresi en Pollando en la jaro 1987. Tiun ĉi inviton ni kun kontento akceptis.

La 24an de februaro 1986, la Plenum-Komitato de SAT ricevis (preskaŭ 3 jarojn poste) novan leteron kiu klare indikas ke PEA ne plu subtenas nian projekton kongresi en Polio (vidu kompletan dosieron en la aprila numero de Sennaciulo). Malgraŭ la prudenta tono de tiu teksto, ni bone scias, ke sen la subteno de PEA ni ne povas okazigi SAT-kongreson en Polio. Tiu situacio provokas damaĝon al nia Asocio sed ankaŭ al la tuta Esperanto-movado. Do, ni ne povas resti silentaj pri tio. Tial ni alvokas la tutan esperantistaron protesti ĉe PEA kontraŭ tiu diskriminacio, kaj ni forte esperas, ke vi estos solidaraj kun nia organizo (unu el la plej malnovaj pilieroj de la Esperanto-movado).

Fronte al tiu decido de PEA, ni publike starigas al vi jenan demandon : **Ĉu vi tamen intencas kongresi en Pollando en 1987 kvankam tio ne estas ebligata al ni ?**

Ni komprenas, ke tiu demando estas tre grava, sed kiu esperantisto en la mondo povus kompreni, ke la celebrado de la centjara datreveno de Esperanto en Polio povus okazi kun tiu makulo : la foresto de SAT ?

Ni sendas tiun publikan leteron al la tuta esperantista gazetaro, kaj ni senpacience atendas vian respondon.

Kun niaj sennaciecaj kaj esperantistaj sentoj,

por la Plenum-Komitato de SAT :
Kreŝimir Barkoviĉ (ĝenerala sekretario)

SKIZO PRI PERSONECO DE ESPERANTISTO, Tyburcjusz TYBLEWSKI. Varsovio 1986. "Ritmo", 67 p.

Ĉu vi scivolemas pri personeco de esperantisto ? Kvankam teorian pri la homa psikologio, la aŭtoro, doktoro pri humanismaj sciencoj, scipovas prezenti la skizon en lingvo sufiĉe simpla por ke ni, post legado de kelkaj paĝoj, ekmeditu pri ni mem.

Mendebli ĉe Louise MARIN, 9 rue Adrien Lejeune, F 93170 BAGNOLET kontraŭ ĉeko de 45 FF (inkluzive sendkostojn).

KRUCVORTENIGMO de Sfinksido

(s.f. = sen finaĵo)

Horizontale :



1. Afrika fruktarbo.
2. Konduktubon.
3. Rilata al arbo, el kies ŝelo oni ekstraktas la kininon. - Komenc-literoj de kataluna profesoro (1891-1965), la plej elstara figuro de la kataluna E-Movado jam antaŭ la unua mondmilito.
4. Mll. de esprimo uzata samsignife kiel nome. - Sub la influo de iu substanco kapabla roli kiel kseno.
5. Poemeto (s.f.) - Rostita pantranĉo (s.f.). 6. Tiu de la mortintoj estas malhelpata de neniuj. - Mara birdo (s.f.). 7. Elementa peceto. - Kondukata de Jano Karal. 8. Malfajnan. - Ĉiu aparta ŝanĝo de loko (s.f.). 9. Iom da azoto. - Malsupera besto formanta polipojn. 10. Al ia loko. - La supra parto de homa korpo (s.f.). 11. Troja pastro sufokata kune kun siaj du filoj de du monstraj serpentoj, estas temo de fama antikva skulptaĵo.

Vertikale :

1. Klara Silbernik, ekzemple. 2. Alivorte, laŭ Grosjean-Maupin. 3. Rezinoriĉa ligno (s.f.) - Tempospaco (s.f.) - Sur aŭtomobilo veninta de Amsterdamo.
4. Rapida kaj brila komponaĵo por piano. - Inklino (s.f.). 5. Dolaro estas tiu de multaj el niaj samtempuloj (s.f.) - Plej alta grado. 6. La baroka stilo multe uzis ĝin. - Parto de spaco (s.f.). 7. Ĝi bezonigas grati sin, kie ĝi eniĝas. - Gento loĝanta en Kamboĝo. 8. Literumante : taĉmento. - Trudherbo simila al lamio kaj nomata urtiko en multaj nacilingvoj. 9. Li havas sian lokon en la budhisma panteono. 10. Ronĝulo el Nord-Ameriko, liveranta pelton nomatan Hudson-lutro. - Egipcia Dio de la suno.

Krom la kutimaj rubrikoj la venonta numero enhavos tekston de Albert Jacquard, estro de la genetika fakto en la franca Nacia Instituto por demografiaj studoj : "Rompoj", ĉerpita el lia libro "Ĉu riskas danĝeron la scienco?". Traduko de D.C.

En tiu venonta L! vi trovos ankaŭ ĝisdatigan liston de la novaj abonantoj. Ne malfru tiuj, kiuj volas aldoni personajn informojn al sia adreso.



MORGAŬ VI MORTOS

Ĉu povas ekzisti io, kiu malhelpos iun morti ? Mi opinias, ke ne, ĉar ĉiu estas mortonta. Sed kiam mi rigardas farojn de homoj, ŝajnas al mi, ke morto esceptas ilin. Evidentiĝas, ke, se oni tro pensas pri la morto, oni nenio estos antaŭ ol morti, sed tio ne devas signifi, ke morton oni devas tute forgesi. Fakte, ĉu ĉiam pensante pri sia morto oni nenion faras aŭ akiras kiel bienon ? Se jes, ĉu pro tio tiuj, kiuj estas riĉaj aŭ/kaj eminentaj devas humiligi malriĉulojn kaj malsanemulojn, ignorante, ke ankaŭ ili forpasos aŭ aliĝos ? Miaj spertoj pri la vivo en mia medio igas min revema. Faroj de kunuloj humiligas kaj tristigas. Morgaŭ, ankaŭ vi mortos, vi, kiu altiĝas. Jen la sola sentenco, kiu pacigas mian koron vidalvide al faroj de homoj.

Necesas esti sur la stratoj por atesti kiel homo ne konas homon. Kial li devas trakti aliulon ? Rigardu lin, li diras sinestime, ke li estas ministro ; pro tio li ne volas observi la kodon pri trafiko ; li veturis iel ajn kaj forŝovis la biciklanton en lagunon. Jes, ĉi-lasta mortis kaj la ministro nenion diris, ĉar kio estas ĉi tiu senvalora aĵo kaj kion ĝi povas riproĉi al li ? La ministro kontaktis samprofesulojn kaj tiu afero ne estos publikigita. He, vi, proletoj! Se vi parolas pri tiu afero, vi estos ĵetita en malliberejon. Ho! Morgaŭ ankaŭ vi povos esti tia, via ministra Moŝto ; vi sciu, ke viaj praŭloj forpasis, do morgaŭ vi mortos.

He! iru eksteren! kun tiaj flikitaj vestaĵoj surkorpe vi volas sidiĝi sur mia kara brakseĝo ? Kiu venigis vin tien ĉi ? Malaperu for de mia vido, sentaŭgulo. - Amiko, vi naskiĝis nuda, kaj nuda vi forpasos. Kial do moki tiagrade samhomon pro lia nudeco ? Li ne estas tiel riĉa kiel vi, kaj pro tio vi subestimas lin. Ho, rigardu lin! Li eliras plormiene plendante pri sia sorto! Ho ve!

Mi ne povas manĝi kun vi, ĉar kiu estas ĉe la kapo de la tablo, tiu ne taŭgas manĝi kun ni. Kial mi tiom eminenta manĝu kun polvo ? Rigardu lin, li ridas. Eĉ lia rido estas malagrabra, malbona, kun sendenta buŝo. He sinjoro! Ĉu vi ne povas demeti la okulvitrojn antaŭ ol manĝi ? Mi helpas vin tion fari. Ha! Li estas eĉ unuokula. Kial vi permesas, ke unu- okululo venis tien ĉi ? Polvero, ne unuokulumu min. Eĉ se necese, mi forbalaas vin ; rapide, for de ĉi tie! - Ve al homo! Rigardu la kompatindulon! Li ne sukcesas plu manĝi, ĉio fariĝas malvarma en lia buŝo kaj naŭzas lin ; li pene stariĝas, kaj lia vizaĝo tute malsekiĝas. Li adiaŭas la kunmanĝantojn kaj silentego superregas la manĝejon.

Se Homo povas kompreni, ke homo restas homo, homo ne spertas malbenon. Kvin fingrojn ĉiu mano havas, kaj ili estas malsamlongaj ; ni ne metas diferencon inter ili, ĉar ĉiu plenumas sian rolon. Se homo povas kompreni, ke ĉiu havas sian destinon, ne ekzistas humiligo, plendo kaj envio. Vi, kiuj humiligas proksimulojn, sciu, ke ankaŭ vi estas polvo. Polvo ĉiu estis, kaj polvo ĉiu fariĝos. He! Klopodu mediti la sentencon de Hillel : "Kio estas al vi malagrabra, tion ne faru al la aliaj". Nur per la meditado de tiu sentenco, Homo respektus samhomon. Jes, vi ĉiuj, kiuj humiligas, sciu, ke la morto frapas al ĉies pordo, kaj la tagon de via forpaso, viaj oraĵoj, multekostaĵoj, per kiuj vi altrangiĝas, ne sekvos vin. Oj! kia horloĝo la vivo estas ! La samaj montriloj ĉiam turniĝantaj indikas kaj bonajn kaj malbonajn tempojn. Ĉio aliĝas. Homo, komprenu, ke kio vi estos, tio vi ankoraŭ neestis.

GBEGLO Koffi.

SALUTON AL LA PRINTEMPO !

Printempo, amiko kara, cia nomo elvokas brilan ekflugon de blankaj kolomboj, korbon da ĝojoj kaj ridetoj, plenbrakon da amo kaj espero. Jaron post jaro ci mirigas kaj ravas min. Kun la sama emocio, la sama festo, la sama dankemo, ni akceptas cin.

Cia ĉarmo plibeligas ĉion, ci estas kvazaŭ la Princo, kiun la Belulino atendas post longa dormado ; ci malfermas la pordojn de nova reĝlando. Dank'al ci la tero subite radias, kantas, fariĝas grandega bukedo multkolora : miliardoj da plantoj kaj floroj denove aperas, elkreskigas entuziasmajn tigojn. Ho penso, ofero de la juna sezono al la mondo, la tremetoj de viaj velurvizaĝetoj ebruiĝas nin!

Ĉiu arbo iom post iom eklumigas novajn foliojn kun ĉiuj nuancoj de la verdkoloro. La hipokaŝtanoj, blankaj kiel junedzinoj, la persikarboj kun tenera rozkoloro, oferas sian paradizon al la eterna tero. La ĉeriz- kaj pirarboj fleksiĝas sub helaj neĝflokonoj ; la mildaj petaloj, anĝele, papilie kirl- iĝas. En la arbaroj fluas tute freŝaj la odoroj de la rezino, suko, betula siropo : ili penetras en mi kiel koloroj kaj bird- etoj. Ankaŭ la ĝardenoj bonodoras : la vento transportas dolĉ- ajn, delikatajn parfumojn, semas karesojn kaj kisojn sur la teron. Ĉie la vivo eksplodas, ŝprucas kiel ora geĵero

Victor Hugo talente skribis : "La herbero estas rava, la naturo estas kontenta havi ĉion, la spaco amas ; ŝajnas, ke ĉio ridas kaj ke la verdaj arboj ĝojiĝas esti en kuno. Nokte oni kredas aŭdi ion feliĉan kanti en la infinito."

La mirindaĵoj kreskas apud ni ĉiuj ; ni ĝuu ilin kaj dancu nian vivplezuron sub la suno de la Sankta Amo. Ni ekkonsciu pri la belaĵoj, kiuj ĉirkaŭas nin por nutri niajn okulojn kaj nian koron kaj donaci tiun ĝojfaskon al malbonsanculoj.

Kiam ni pensas pri tio, la plej bona, la plej pura en ni fontas el iaj grandiozaj spektakloj. Niaj pensoj kaj agadoj ĉerpas sian energion el riĉigaj kontemplaĵoj. Ju pli ni admiras belecon, des pli ni kapablas krei bonecon. Tial ni partoprenu la feston de la naturo, kiu en nin verŝas entuziasmon, gajviglecon kaj esperon. Kaj estas vere, ke ĉio ŝajnas rekomenciĝi kun novaj ŝancoj. Ni deziras forlasi niajn malbonajn kutimojn, etspiritaĵojn, antaŭjuĝojn, ni aspiras fariĝi floro por renaskiĝi por pli bone ami.

En la konvala arbareto, inter la birdaj kantoj, la fingroj de la junuloj serĉas tiujn de la junulinoj. Tio estas la dolĉa tempo de la gefianĉiĝo, tiu, kiun oni prenas por diri : "mi amas cin"...

*En la kampoj, ĝardenoj, arbaroj, arbustaroj, okazas la mir- inda kresko de la vegetala amo. Dum kelkaj semajnoj, plantoj kaj arboj liberigas tunojn da poleno ; ovuloj estas fekundigitaj. Por ke la vivo daŭre estu... La bestoj, insektoj, ankaŭ fiŝoj sekskuniĝas. Por ke la vivo daŭre estu... Kia grandega murmuro! Kiom da tremoj pro amĝuo ekflugas el la arbetoj en la aeron ŝarĝitan de vinkaj bonodoroj! Je kia nekonata himno valsas la efemeroj en la grandaj kanoj ? Ĉi- nokte la najtingalo kantas la amplezuron, la vivmiraklon. Ho printempo, luma kaj parfuma festo! En ciaz ŝanĝbrilaj koloroj kiom da dolĉaĵoj, kiom da belaĵoj! Ci forgesiĝas al ni pluvon kaj froston de la vintro. Dank'al ci eĉ malsatuloj, mal- sanuloj denove retrovas la esperon... Estu dankita, kara amiko, kaj nia ekzistado estu eterna printempo. **Michèle Freud.***

ĈU NIA NUNA CIVILIZACIO ESTAS PLI (...) OL LA ALIAJ?

(La leganto enmetu pozitivan adjektivan laŭ sia plaĉo)

Unue mi rimarkigu : Nia civilizacio estas verŝajne la sola, kiu **kreis mankon el abundeco**.

Ĉar la manko de laboro estas konsekvenco de tro abunda produktado. Cetere, ĉu la kono, kiun ni havas pri la mondaj civilizacioj estintaj aŭ estantaj, ne estas mensogoj ? Certe, ni malkovras, ke nia civilizacio produktas poluciojn, malfeliĉon ktp, sed ĉu ni ne kredas, ke ĝi enhavas pli da bonaĵoj, ke ĝi eltiris multajn popolojn el profunda mallumo ? Sed rimarku, ke ni scias malmulte rilate la neeŭropajn civilizaciojn kaj niaj konoj devenas de blankulaj raportantoj, kvazaŭ ĉiam rilatintaj kun koloniistoj (militaj, civilaj kaj religiaj).

Ekzemplo : Kelkaj (?) maldekstruloj legis ateston de "spertuloj" laŭ kiu Kanakoj estas anoj de malnova kaj evoluinta civilizacio... sed antaŭ kelkaj jaroj la gazetaro prezentis la ribelulojn de la arbaro kiel "sovaĝulojn"... Iom pli antaŭe la vorto kanako estis sinonimo de kanibalo.

Ni scias, ke grandparto de la tekniko ne alportas bonstaton sed vi diru : Ni konstruas ne nur turismveturilojn, sed maŝinojn por pligrandigi la manĝproduktadon, ktp. Sed ĉu utilas, se la malsato kreskas ?

Vi diros : La malsato kreskas ĝuste en elvolviĝantaj landoj kaj forestas ĉe la maŝinposedantoj.

Eraro. Jam de pli ol unu jarcento la en Francio plej konsumita oleo estas el arakido, planto kiu kreskas en afrika parto, kie ofte regas malsato. Ni povas vidi en grandaj vendejoj, ke multaj estas la nutraj produktoj devenantaj de malriĉaj landoj. Plie, nun la bestoj nutroproduktantaj estas bredataj ĉefe per produktoj fabrikataj per importitaj vegetaloj.

Aliflanke, ĉu la eŭropaj landoj estis pacemaj, nekruelaj ktp ? La historio montras al ni la malon. Ekde la Inkvizicio, kiam oni mortigis, torturis je nomo de la sankta kredo, ĝis naziismo, dum la du mondmilitoj, dum Alĝeria kaj Vjetnamia militoj, kiom da buĉadoj, abomenaĵoj, barbaraĵoj ! Mi ne parolis pri Hiroŝimo nek pri la fakto, ke la grandaj, modernaj ŝtatoj fabrikas ĉiam pli da armiloj kaj eĉ prosperas per ilia vendo.

Ni parolu nun pri la neokcidenta civilizacio.

Unue, se estas nur eta diferenco inter la blankulaj landoj, male estas por la restanta mondparto, kiu entenis multegajn diversajn civilizaciojn kaj religiojn.

Do se en iu neeŭropa popolo regis iu malbona kutimo, estas

grava eraro atribui al aliaj popoloj saman malvirton.

Ni povas ekscii, ke multaj neeŭropaj popoloj estis malpli batalemaj, malpli kruelaj, barbaraj, ol la eŭropaj, ke ekzistis ĉe ili multe pli da solidaremo.

Ekz. pri kanibalismo : ĉar ne estis konata en Eŭropo tiu formo de sovaĝeco, sed ankaŭ ĉar ni emas rigardi la pajlon en alies okulo, ni povis malbeni ĝiajn adeptojn, sed ni vidis, ke eĉ se oni esceptas naziismon, nia civilizacio estis mem eĉ pli kruela. En kiom da landoj estis praktikata la kanibalismo ? Kaj ĉu en iu "kanibala" lando tiu praktikado estis oftega ?... Ni rimarku, ke laŭ popolkonscia vidpunkto kanibalismo estis kruelaĉa sistemo ofte praktikata ĉe ĉiuj nigruloj.... kaj la "scio" estas egala por aliaj aferoj.

La virtoj de neokcidentaj popoloj estas nekonataj. La malvirtoj estas trogravigataj, plioftigataj kaj ĝeneraligataj.

Tio estas nur ekrigardo. Oni devas multe pripensi la aferon por reĝustigi la ĝeneralajn konojn. Tio estas ankaŭ alvoko al specialistoj pri neeŭropaj civilizacioj, por ke ili pli studu kaj informu pri la temo.

Oni devas ankaŭ reĝustigi la konojn pri eŭropaj civilizacioj. Iĝi estas pli konataj sed ĝenerale mensogaj. Oni atentu mal-fidi "patriismon", ne nur ŝovinismon kaj naciismon, ĉar necesas multe da kuraĝo kaj serioza informo por klare vidi la veron.

"Pri propra afero neniu juĝas perfekte". Do facile, ĉefe en necerteco oni donas la veron kaj la bonon al sia flanko (lando, civilizacio ktp.) kaj la malon al alia.

L. A.

KIU KAJ KIO MI ESTAS

Estante tre modesta, mi ne estas mondfame konata. Mi tre koleras kontraŭ la reklamoj, kiuj kovras niajn murojn, kaj mi decidis ŝanĝi mian sintenon por fari egan propagandon pri mi mem.

Mi naskiĝis la 22-an de junio 1917 en Parizo, filo de masonisto kaj de kudristino. Verŝajne estis eraro : sendi animon tiel intelligentan sur tiun planedon, kie regas la plej granda konfuzo, plie en familion, kies instrunivelo kaj inteligenteco estis tre modestaj.

Kvankam oni faris ĉion por malhelpi al mi sukcesi : mi preskaŭ ne vizitis lernejon, dum la milito, mi suferis 5 jarojn da kaptiteco, poste mi estis nur helpŝtaticisto, ĉar intertempe mia patro forlasis sian entreprenon, mi tamen sukcesis fari kelkajn komplementajn studojn.

Feliĉe, dum pluraj jaroj mi havis intelligentajn ĉefojn, kiuj sciis uzi miajn

kompetentecojn en diversaj okazoj... por persona profito. Kompreneble, ili ricevis dekoraciojn kaj faris promeson al mi, ke mi estos nomita "kontrolisto", sed nur dum mia lasta jaro de laboro, pro tio ke mi ne havis diplomojn.

Malfeliĉe, aliaj ĉefoj, ankaŭ komputilo alvenis. Nek la ĉefoj nek la komputilo faris promeson al mi, kaj ili opiniis, ke mi estas sufiĉe maljuna por eliri nur kun la plej alta grado por simpla agento.

Ankaŭ malfeliĉe, mi malsaniĝis monaton antaŭ mia foriro, kaj tiam mi perdis preskaŭ 2 monatojn da jara libertempo kaj da ripozkompensoj, kiujn oni ŝuldis al mi. (Post 65-jara, oni ne plu rajtas ricevi ion, krom la emeritan renton ; do mi estis samtempe en malsanulejo kaj en jara libertempo aŭ ripozkompensoj.)

Estas pro Esperanto, ke mi pli bone lernis mian gepatran lingvon, kiun mi "manipulis" tre strange, miksanĉe al ĝi la stratinfanan slangojn de la antaŭurboj kun kelkaj kamparaj esprimoj, kiuj ŝajne estis amuzaj, sed ne tradukeblaj, ĉar ne troviĝis en la vortaroj.

Por Esperanto, mi havis plurajn profesorojn. La lasta estis Johano THIERRY, nuna prezidanto de F.E.I. Kvankam pro aliaj aferoj mi forlasis Esperanton dum kelkaj jaroj, mi tamen kotizis al nia nacia asocio kaj al SAT, kaj mi estas D.M. de UEA.

Post mia malsano, mi decidis fariĝi verkisto dulingva, kaj mi komencis skribi plurajn ĉefverkojn, sed, ĉar mi rapide laciĝas, mi skribis nur gravajn enkondukojn - kiel necesas por ĉefverkoj - kun la unuaj kaj la lastaj paĝoj ; poste, mi ne plu bezonis skribi la internajn paĝojn, ĉar mi sciis kiamaniere la aferoj finiĝis.

Per tia genia metodo mi ŝparis multe da tempo, kiun mi uzis por pli seriozaj aferoj, ekzemple : ekologio. Por helpi al la naturo, mi havas ankaŭ geniajn metodojn. Nuntempe* mi faras provojn sur la tereno de amiko, en Bois-le-Roi, apud Fontanbelo, ĉe la limo de la ŝtata arbarego. Ankaŭ tie mi faras kursojn de Esperanto kaj estas ĝuste por montri al estonta lernanto kiamaniere skribi pri si mem al korespondanto, ke mi verkis tiun tekston.

Miaj geamikoj nomas tion "Gastonajo", kaj kiam novulo miras, ke mi havas tiom da bonegaj ideoj, mi frapas mian frunton kaj diras : "En mia ideokesto estas vera muzeo " kaj se la stultulo demandas : "Muzeo, sed pri kio?", mi respondas : "Estas la muzeo pri neatenditaĵoj!" Kaj estas vere : minuton antaŭe, mi ankoraŭ ne scias kia mirinda stultaĵo eliros el ĝi.

Kiam okaze mi paneas, aŭ kiam mi ne plu trovas ion interesan sur la tero, mi vokas la Eksterteranojn. Kun ili oni povas ĉion imagi, sed ili ne tre ŝatas la Teranojn. Ili asertas ke, en la tuta Universo, ne troviĝas planedo, kie la malordo estus tiel bone organizata. Tamen, pri mi, ili konsentas, ke mi estas escepto kaj ke oni povus klasi min inter la plej gravaj mirindaĵoj de la Universo... post ĉiuj aliaj !

Mi restis fraŭlo kaj mi komprenis kial, leginte en virina gazeto tiun frazon : "Kiam oni amas lumon kaj sunon, ne estas amuze vivi en la ombro de granda viro!". Kaj tiun pli personan de fraŭlino, kiu helpis min por gvidi turistojn en Parizo : "Edziniĝi kun li, kia abomeno! Pripensu : viro kiu jam scias ke oni mensogos, eĉ antaŭ ol ni malfermis la buŝon!".

Do karaj legontoj kaj korespondantoj, profitu je miaj tekstoj dum estas ankoraŭ tempo. Tiuj juveloj certe havos grandegan valoron... almenaŭ pro sia malofteco!

Gastono

* Mi ne plu iras al Bois-le-Roi de septembro '85. Mi iras al St Brice, apud Montmorency, en ŝtatan arbaron, kie mi laboras, eksperimentas, ktp, sen oficiala permeso !

jen nun (fin)fino de longega debato :

CIRKLOKVADRATURO, Nombro PI, Diagonalo, Pruvo kaj fino

En la lasta L. mi anoncis, ke mi ĉesigas senutilan pseŭdopolemikon pri la cirklokvadrato kaj ĝiaj akcesoraj problemoj. Sed la plej elementa intelekta honesteco devigas min pruvi, ke de kvar jaroj mi ne tedas la L.-legantojn per senbazaj asertoj. Mi ja demonstris, sed ne pruvis. La pruvado fakte ŝajnas unuavide nebla. Sed ĉu ĝi vere estas tia? Ni tuj ĝin konstatu.

Pri la nombro PI.

1^o - Kiam oni multiplikas kvadratan radiuson (R^2) per 3,1416, tio fakte signifas, ke oni serĉas la areon de kvadrato 3,1416-oble pli ampleksa, kies areo ekvivalentas tiun de cirklo kun difinita radiuso. Tio supozigas, ke oni jam antaŭe dividis la areon de iu kvadrato per la kvadrata radiuso de samarea cirklo, kaj ricevis, kiel kvocionton, la rilaton 3,1416. Ekzemple, se oni dividas A per B, la kvocionto estas C ; kaj se oni multiplikas C per B, oni ricevas, kiel produkton, la dividaton A, kun aldono de la divida reziduo se necesas. Do, se A estas 196 (areo de kvadrato) kaj B 62,41 (kvadrata radiuso de samarea cirklo), la kvocionto estas C 3,1405 kun reziduo. Kaj se mi multiplikas C 3,1405 per B, mi ricevas A + reziduo = 196. Tiu regulo estas instruata en ĉiu infanlernejo, sed ĝi nur ne estas aplikebla al 3,1416, ĉar oni ne scias de kiuj A kaj B 3,1416 estas la kvocionto. Tial ĝi ne povas pruvi sian ĝustecon per inversa operacio.

2^o - Esplorante la rilatojn inter la cirklo kaj la kvadrato, oni konstatas, ke la rilato inter la cirkonferenca longeco kaj la areo de cirklo konstante varias laŭ la kvarono de la diametro. Konsekvence, ĉar oni scias per la geometria kaj la aritmetika solvoj de la cirklokvadrato, ke al kvadrato kun

latero 14 respondas cirklo kun diametro 15,8, eblas kompari kaj konstati, kiu el 3,1416 kaj 3,1406 estas ĝusta. Sufiĉas dividi la areon de la kvadrato : $14 \times 14 = 196$ per la kvarono de 15,8, t.e. $15,8 : 4 = 3,95$, kaj $196 : 3,95 = 49,62025(316)$, kiu apriore estas la cirkonferenca longeco de cirklo, kies areo ekvivalentas tiun de kvadrato kun latero 14. Nur plu sufiĉas kalkuli la cirkonferencan longecon de tiu cirklo per 3,1416 kaj 3,1406 kaj kompari. La dimensio pli proksima al 49,62025(316) estos la pli ĝusta.

Per 3,1416/ 15,8 x 3,1416 = 49,63728 - 42,62025 = + 00,01703

Per 3,1406/ 15,8 x 3,1406 = 49,62148 - 42,62025 = + 00,00123

Krome per 3,1405224/

$15,8 \times 3,1405224 = 49,62025(392) - 49,62025(316) = 00,00000(076)$

Do, 3,1406 ĝustas preskaŭ 14-oble pli ol 3,1416, kaj 3,1405224 tute ĝustas ĝis milionono. Ĉar en la apriora komparilo $196 : 3,95 = 49,62025(316)$ la kvadrata radiuso kaj la nombro π ne rolas, ili do ne influas. La eta diferenco per 3,1406 devenas de la rondigo de 3,1405223... kaj la pli granda diferenco per 3,1416 devenas de la troa 1 inter 4 kaj 6.

Konsekvence, la konkludoj de la geometria kaj de la aritmetika solvoj de la cirklokvaadrato estas ĝustaj. Al cirklo kun diametro 15,8 respondas kvadrato kun latero 14, kaj la rilato inter ili estas ja 7/7,9 kaj inverse 7,9/7.

La ĝusteco mem de tiuj solvoj ebligas la determinon de alia ĝusta kaj konstanta rilato inter la areo de cirklo kaj de ĝia ĉirkaŭstrekita kvadrato, kaj kalkuli la cirkonferencan longecon kaj la areon de tiu cirklo sen helpo de la nombro π . Tiu rilato estas 1,273642 kun nur unu milionona eksceso. Ekzemple, pri cirklo kun diametro 15,8. $15,8 \times 15,8 = 249,64$ (areo de la ĉirkaŭstrekita kvadrato); $249,64 : 1,273642 = 196,000$ (areo de la cirklo); $196 : 3,95$ (1/4 de la diametro) = 49,62025(316) cirkonferenca longeco de la cirklo.

Mi uzis la cirklon kun diametro 15,8 kaj la kvadraton kun latero 14, ĉar ili konsistigas la bazon mem de la aritmetika solvo de la cirklokvaadrato, kaj evitigas tedajn rekalkuladojn de novaj areoj kaj cirkonferencoj, sed la ĉi-supraj procedoj samvaloras por ĉiudimensiaj cirkloj kaj kvadratoj.

Pri la diagonalo.

La diagonalo estas konsekvencaĵo de la cirklokvadratiĝo ; ĝia ekspansio estas limigata de la cirkonferenca longeco kaj, pro tio, neniam atingas sian plenan ekspansion, kio kaŭzus la detruon de la cirkonferenco, de la cirklo kaj de la kvadrato. Pro tio ĝi havas ja du longecojn : unu "efektivan" kaj unu "teorian", kaj estas paradokse, kaj male al tio, kion mi opiniis, "strekebla sed ne mezurebla". La nemezurebla estas la "teoria", kiu tamen restas kalkulebla. Pro tio mi pravis, dirante, ke la rilato inter la latero kaj la diagonalo estas : 7/10, kaj mi ankaŭ pravis dirante, ke ĝi estas 7/9,905. La fakto, ke la aritmetika solvo de la cirklokvaadrato, konfirmita de la geometria, montriĝas ĝusta, pravas pri la ĝusteco de la "teoria" rilato 7/10, kaj la teoremo pri la "kvadrato de la hipotenuzo" de Pitagoro pravas la ĝustecon de la "efektiva" rilato 7/9,905. Per tiu rilato la rezonado de la aritmetika solvo kondukus al

rezultoj tute ne kongruaj kun la realeco. Tiu rilato konfirmas ankaŭ la ĝustecon de la rilato 7/7,9 de la aritmetika solvo. Ĉar se la latero de la hipotenuza kvadrato estas 9,905, la diagonalo de tiu kvadrato estas :

$9,905 \times 9,905/7 = 14,05575$, kaj la rilato inter ambaŭ estas :

$14,05575 : 9,905 = 1,415$. Tio signifas, ke multiplikante la lateron de iu ajn kvadrato per 1,415, oni rekte ricevas la diagonalon de tiu kvadrato. Do, kun latero 14 : $14 \times 1,415 = 19,81$, kiu estas la diagonalo ricevita per la aritmetika rezonado helpe de rilato 7/10. Kio pravas, se necese, ke la du longecoj de la diagonalo ne estas fantaziaĵoj, sed efektivaĵoj. Cetere, la rilato 7,9/7 ankaŭ ebligas kalkuli la diagonalon de samarea kvadrato per multipliko de la diametro de tiu responda cirklo, kaj aldonante la okonon de la diametro al la produto. La rezulto ĝustas je unu centono. Tio montras, ke la rilato 7/7,9 estas la ĝenerala rilato inter ĉiuj dimensioj de la cirklo kaj de la kvadrato. Por ricevi la "teorian" diagonalon, necesas nur uzi la rilaton 7/10. Ekzemple, $14 \times 10/7 = 20$.

Jen resumitaj miaj konkludoj pri la cirklokvaadrato kaj ĝiaj akcesoraj problemoj. Necesas nur bonvoli kontroli ilin por konstati ilian ĝustecon. La fakto, ke mi demonstras ilin en L. kaj senpage, ne signifas, ke ili apriore estas senvaloraj. Same estas pri miaj poemoj, preskaŭ sesmilversa verko originale verkita en Esperanto, kiun mi pretas sendi tute senpage al ĉiuj L.-legantoj sufiĉe mense liberaj por mendi ilin rekte al mia adreso : B.G.Delalot, 10 Route de Serres, F 24500 EYMET, Francio.

Ĉi tie finiĝas por mi la problemoj pri la cirklokvaadrato kaj pri ĝiaj akcesoraj problemoj. Dankon al ĉiuj, kiuj interesiĝis pri ĝi.

En Eymet 1986/03/21

B.G.D.

KONSTATOJ KAJ FAKTOJ

Mi ne plu polemikos kun nia simpatia poeto kvadraturisto, ĉar kun li ĉia diskuto estas vana : ni ja ne ludas sur la sama ondolongo. Mi nur konstatas faktojn.

Unua fakto : en L! 65, p.12, BGD ne plu insistas pri sia "logika" 3,1406, kaj diras, ke li uzas "kiel ĉiuj" la gurditan 3,1416 (kiun li tamen nomas trompa). Kiel la inĝenieroj ne inĝeniaj kaj la sengeniuloj, kiuj sin tenas humile al la rezultoj de simpla kalkulo. Mi notas tiun konvertiĝon de nia poeto al la ĝenerale agnoskata (proksimuma) valoro $\pi = 3,1416$, kiun li tamen juĝas falsa. La interesatoj bonvolu relegi la tutan serion de liaj artikoloj, kaj vidi, ĉu inter liaj argumentoj estas unu vera demonstro, aŭ nur senpruvaj asertoj.

La dua konstato eble kontentigos lin. Pri $\sqrt{2}$ la inĝeniero ne inĝenia, kiu mi estas, grave eraris. La ŝajna periodeco de la unuaj ciferoj 1,414, igis min kredi, ke la tuta nombro estas perioda. (Min erarigis la fakto, ke en divida, oniga kalkulo - decimalaj frakcioj -, kiam aperas periodo, ĝi pludaŭras senfine. Bona ekzemplo estas tiu donita de PMG : $140/99 = 1,41414...ktp$. Sed ne same estas en la ekstraktado de radikoj.

(daŭrigo sur p. 31)

... rigardante alaŭdon.

tial poemon al ĉiuj, tiel poeto...


POEMO estas BOMBO ——— ...!

— poeto estas alia unu teroristo,
kiu ne povis meti fikshoran bombon tien,
hazarde ✗ sed, — bonŝance
kaj malbonŝance ✗ rigardinte infanan rideton - tie.
tiam se li/ŝi ne trovis tian etan...

— tial poemo estas bombo
tial poeto estas tro naiva.
tial poeto estas soleco,, tamen estas forta
ĉar li/ŝi havas milionon da kamaradoj aŭ eĉ geamatoj
en sia sino

tial ne ĉiu iam ajn povus fariĝi poeto,
sed poeto ne estas profesio. li/ŝi ne povas vivteni,
vendante poemojn. ne devus esti tiel —

— sed ne devus ekzisti tia grundo, kie ne povas vivi poeto
ĉar, tiam sur la tero devas esti nur soldatoj kaj
- male aŭ same - tiuj teroristoj, kiuj metis pulvon en
sian poemon... por/pro geamatoj perditaj

ĈU bombo ESTAS poemo 
poeto estas tiu..., kiu anstataŭig-is aŭ -as armilon per
vortumilo

tial poemo estas, tial poeto... tamen,,,
morgaŭ kiu ci estus — ?

f. de S.L.A.-e frakcio



Konstatoj kaj faktoj

Nu, en matematiko oni devas ne kredi, sed pruvi kaj kontroli. Mi faris kontrolon, kalkulante la kvadratojn de la du valoroj, la mia kaj tiu de PMG ("Nombroj", p.13). Mi trovis

$$1,414141414^2 = 1,9997.....$$

$$1,414213562^2 = 1,999999998...$$

La dua estas multe pli proksima de 2. Ĉiu, kiu scias multopliki, povas refari tiun kontrolon.

Poste mi kalkulis $\sqrt{2}$ kun 9 decimaloj kaj mi trovis efektive la saman rezulton kiel PMG : 1,414213562.... Kaj se oni daŭrigas la kalkulon je unu plia decimalo, oni ricevas por la kvadrato unu plian 9, kio ankoraŭ pli proksimigas ĝin al 2. Ĉiu, kiu scias ekstrakti kvadratan radikon, povas tion kontroli.

Do, PMG estas prava, kaj mi eraris. Ĉiu matematikisto, ĉu vera, ĉu, kiel mi sinpretenda, devas ĉiam konfesi siajn erarojn. Dankon al PMG, kiu montris al mi mian eraron kaj la ĝustan solvon.

VALO

LA HIPOTEZO

La naturo ne estas justa. Kial ?... La plej mordanta hundo forportas ĉiam la plej bonan oston... kaj mi mem... legu kaj pensu !...

En iu epoko, mi estis jam plenkreskulo, studento en la regurbo de la lando, kiu portas la nomon "Aŭstrujo". Tie, kiel aliloke, la laboristoj de tempo al tempo strikas.

Pro tio mi vidis sur bulvarado de Vieno, nome sur la "Ringstrasse", malgrandan grupon de strik-rompantoj, kiuj iris hejmen, protektate de policistoj pli multnombraj ol ili mem.

Se, en tiu epoko, mi mortpafus ilian gvidanton, mi estus, pro tiom da spektanta ĉeestantaro, kondamnata kaj pendigata, kaj hodiaŭ neniu sciuz, kie ripozas miaj ostoj.

Se hodiaŭ mi konfirmas, ke ĉi tiu mortpunebla gvidanto estis "Hitler" kaj ke per la mortigo de ununura viro, la homaro evitus dum la dua mondmilito la mortigon de 50 milionoj da soldatoj... nek mi, nek la mondo honorus mian "krimon".

Nun, Reagan kaj la ĉirkaŭantaro preparas la trian mondmiliton per blufado de mil "Perŝingoj", ekipitaj per atomaj kapoj - kaj mi ne scias, ĉu ekzistas tiom da plutonio en la mondo, por tiom da kapoj... - kaj Sovetio devas kontraŭstari tiun blufon per blufado de aliaj mil atomaj kapoj nomataj SS... KION FARI KONTRAŬ TIO, kio vere povas ebligi la trian mondmiliton ?

La anoncoj en gazetoj, ĵurnaloj kaj afiŝoj, la amasmanifestacioj efikas neniel, ĉar la Generaloj, kiuj kondukas la militon aŭ la kontraŭmilitojn, estas homoj kiel ni, ili turnas per mensogoj - por siaj personaj profitoj - la volon de la popolo, kiu estas efektive je ilia servo.

Sekve, restas nur unu ebleco por sukcesi : "La milito kontraŭ la militon". Oni devas ĝin organizi kiel veran militon, eĉ kun io plia, kion la vera militisto ne povas nuligi.

Ĉiu oficisto, laboristo, militisto, entreprenisto, kiu helpas la instalon aŭ la forsendon de la atombombo, devas esti mortigata sen proceso kaj sen pardono.

-nn-

ĈU INTERNACIA LINGVO ?

La angla humoristo George Bernard Shaw deklaris militon kontraŭ la multnombraj komplikaĵoj de la angla ortografio. Li proponis por skribi vorton "FISH" (tio signifas **fiŝo** en tiu lingvo) novan skribmanieron : "GHOTI".

Fakte, li klarigis : Oni prononcas GH kiel F, en ENOUGH ; O = I, en WOMEN; TI en NATION donas SH.

Komunikis : Laŭlo

ANALIZA GRAMATIKO

Ankoraŭ pri la landnomoj.

En sia komento al mia artikolo pri la landnomoj, kdo Valo ne sciis esti objektiva. Per aprobaj vortoj li deviis la akvon al sia muelejo. Se **-uj** estas Fundamenta, ĝia anstataŭo per **-i** estas kontraŭfundamenta ; sed pri tio ne estu diskuto : mi ne estas bigoto de la Fundamento.

Fakte la anstataŭo ŝanĝis nenion ; nur kreskigis la konfuzon. Ke Lanti propagandis favore al **-i**, eble estas kortuŝe por iuj SAT-anoj, sed tio ne estas valora argumento, tial ke, pri la lingvo, Zamenhof estis pli aŭtoritata. La solvenda problemo ne konsistas el **-uj** aŭ **-i**, same taŭgaj, sed el simpleco, unuformeco kaj reguleco. Sendube la perfekta solvo estus reveni al la sola uzo de la Zamenhofa **-uj**, sed senesceptigita por ĉiuj landoj kaj landetoj, ĉiam kun la sufikso **-an** por la landanoj. Senpasiĝe oni devus agnoski ke la vortoj kun **-uj** estas pli belsonaj, ĉar sen hiato. Estas pli harmoniaj Francujo kaj francujano, ol Francio kaj franciano, kaj estas belaj vortoj Ĉinujo, Ĉinujano, Japanujo, japanujano, Andorujo, andorujano, Egiptujo, egitpujano, ktp, ktp. Jam sur la spekulativa tereno, oni povus ĉiam lasi la land-adjektivojn sen sufikso, kaj diri : la hispana(j) la andora(j), la germana(j), la ĉina(j) lingvo, moroj, popolo,

kampanoj.

Tiu ĉi solvo, absoluta kaj simpla, estus la plej proksima al la Fundamento, kaj la plej saĝa. Sed probable la esperantistoj preferos plu paŝadi palpe sur la vojo de la rutino, kun la okuloj fermitaj kaj la oreloj ŝtopitaj.

L. Mimó

Por plezurigi al Yves Peyraut, jen citaĵo de lia malnova amiko Kropotkin :

"La emo al interhelpo ĉe homo havas tiom malproksiman originon, ĝi estas tiom profunde miksitaj kun la tuta evoluo de la homa raso, ke ĝin konservi la homaro ĝis la nuna epoko, tra ĉiuj sortobatoj de la historio. Ĝi disvolviĝis ĉefe en periodoj de paco kaj prospero ; sed, eĉ kiam la plej grandaj plagoj superŝutis homojn - kiam tutaj regionoj estis ruinigataj kaj mortigataj de mizero, aŭ ĝemis sub la jugo de tiranismo - la sama emo pluekzistis en la vilaĝoj kaj inter la plej malriĉaj klasoj de la urboj ; ĝi plu interuniĝis homojn, kaj, kun la daŭro, ĝi reagis eĉ al la minoritatoj regemaj, batal-emaj kaj detruemaj, kiuj estis ĝin forŝetintaj kiel sentimentalajn stultulojn. Kaj ĉiujfoje, kiam la homaro devis krei novan socian organizon, respondantan novan fazon de ĝia evoluo, el tiu sama emo, ĉiam vivanta, la konstruema genio de la popolo eltiris inspiron kaj la elementojn de la nova progreso. La novaj ekonomiaj kaj sociaj institucioj, laŭmezure kiel ili estis kreitaĵo de la homamasoj, la novaj moralaj sistemoj kaj la novaj religioj originis el la sama fonto ; kaj la morala progresado de nia raso, resume konsiderata, aperas kiel iompostioma pilargiĝo de la principoj de interhelpo, de la tribo al loĝejoj de ĉiam pli kaj pli multaj homoj, ĝis ĝi fine iam flamigos la tutan homaron, kun ĝiaj malsamaj kredoj, ĝiaj diversaj lingvoj kaj rasoj."

Tiel komenciĝas la 7a ĉapitro de "**La Interhelpo**", havebla en franca lingvo ĉe PUBLICO. Legadon de tiu libro mi insiste konsilas al ĉiuj, kiuj, prave aŭ malprave, kredas sin mem liberpensantaj.

Jakelino

PRI DIVERSAJ RELIGIAJ RITAJ

* La 2an de novembro, katolikoj preĝas por la animoj de la mortintoj. Antaŭ la unua laborkunsido dum ĉiu SAT-kongreso, SAT-anoj, aŭdinte la liston de la mortintoj de la jaro, silentas omaĝe al tiuj putrantaj kamaradoj.

* Kiam mi estis infano, mi lernis ĉe la katolika katekismo, ke bona katoliko devas, dum la paska tempo, konfesi siajn pekojn al pastro, kaj poste partopreni en la eŭkaristio. Ĉiujare dum la Sankta Vendredo, mia frato Roger kaj lia edzino Nicole, kiuj kredas sin liberpensuloj, veturas al Nantes por partopreni la bankedon de la liberpensuloj, kiu konsistas el komuna manĝado de viando.

* Kiam pia judo estas mortanta, li recitas la preĝon "Aŭskultu, Izraelo". Kiam liberpensulo estas mortanta, alia liberpensulo tuj alkuras por reciti kun li ateistan kredokonfesion, ĉar tio helpas lin serene morti.

Se mi iam aŭdos, ke estas projekto kanonizi Lanti-n, mi ne miros...
Jakelino (eks-SAT-ano)

LANDNOMOJ KAJ POPOLNOMOJ

Legante la artikolon "Landnomoj kaj Popolnomoj" en L! n-ro 65/83, mi estis puŝata al la partopreno en la afero. Mi ne estas gramatikemulo, sed permesu al mi uzi la rajton prezenti la vidpunkton de portugallingvano.

Al la aŭtoro de la artikolo mi donas la konsenton pri la maniero esperantigi la nomon de la lando (Brazil) Brazilio, kaj de la loĝanto braziliano. Tamen ne same okazas pri la esperantigo de la ĉefurbo (Brasilia). Laŭ mia opinio estas pli konvena kaj natura la vorto "Brazilja" ĉar la tri lastaj literoj portugallingve formas unu silabon. Tion ĉi ni devas atenti por ne tro deflankiĝi de la originala sono.

La PIV registras la formojn Brazil/o por la federacia ŝtato kaj Brazilio por la ĉefurbo. Mi ne konsentas kun tiuj aranĝoj, kiuj malproksimiĝas de la formo "i/o" por formi la landnomojn. Krom la formoj de PIV, en la nun pri-traktata problemoj starigas konfuzon.

Mia opinio baziĝas sur la fakto, ke por esperantigi la nomon de la lando (Brazil) oni uzas la literon "Z" anstataŭe de "S" ĉar ĉi tiu, en la portugala, sonas kiel la unua. Do, oni povas havi la saman kriterion por esperantigi la nomon de la urbo, ne disigante la literojn "lia" kaj uzi la respondan "ljo", "lja", kiuj estas ankaŭ unusilaba grupo.

Por la loĝantoj oni povas uzi la vorton braziljano, kio ne ŝajnas malĝusta nek maloportuna.

Ĉar la brazilianoj estas ankaŭ portugallingvanoj, certe ili havas iun parolon por eldiri pri la supra afero. Por decidi la lastan kaj definitivan formon de tiuj vortoj estas konsilinde enketi ĉe ili.

Poste, restas agi laŭ la 15a alineo de la Fundamento de Esperanto kaj atendi la estontan preferon de la esperantistaro.

(Marto 1986) **Alberto Pedro da Silva**

Respondo al la "Letero el Rumanio" (p.6 de L! 65)

Mi legis vian verkon, mi legis "sortkunulon"...

Kaj granda estas tristo de la mia koro...

Mi gratulas al via skribaĵo kaj mi miras pri via kuraĝo, ĉar mi bone scias, ke vi riskis ne nur vian "labor"-on sed ankaŭ vian vivon. Mi ne intencas komenti la artikolon. Mi havas en via regiono familianojn, geparencojn, kiujn mi ne volas suferigi. Se tio ĉi ne estus, mi povus adicii al via letero plurajn detalojn. Manko de manĝaĵo (ĉefe!), manko de libereco,

malebleco uzadi la gepatran lingvon, ktp, ĉiuj kune faras montaron da ĉagreno. Via lando ĉiutage faras grandan paŝon malantaŭen, de la elektro-uzado al la lumigado per vaskkandelo (kiam oni trovas), de du diversaj tuttagaj televid-programoj al unu sola, duhora (ĉiun tagon), blanka-nigra elsendo.

Mi volonte donus al vi la t.n. vizon, se tiu de mi dependus. Kaj vi ne estas la sola, kiu dezirus veni vivi ĉi tien (aŭ en alian liberan landon). En viaj ĵurnaloj vi ofte povis legi pri la granda problemoj de la evoluantaj, kapitalismaj landoj, kie estas NUR senlaboreco, mizero, sinmortigado, alkoholismo, malegaleco, vi vidis fotojn pri almuzuloj, senhejmaj personoj, kiuj dormas sur la strato. Troigita vero, kaj unuflanka realeco. Estas vere, ĉar ĉi tie nenion oni kaŝas, kontraŭe. Evidente, ĉe vi almuzuloj ne estas, ĉar tiu profesio estas malpermesita. Alie : de kiu peti monon, kiam neniu havas sufiĉe. Vi bone scias tion.

Vi kuraĝis esperi, ke eble iu lando enlasos vin malgraŭ siaj problemoj. Mi deziras sukceson al vi. Kredu min, se Francio hezitas, estas ĉar la lando estas jam plenplena de gefremduloj, kiuj "pretendas" labori. Ankaŭ mi mem estas rifuĝinta, ankaŭ mi apartenas al la gesenlaboristoj, tamen mi estas feliĉa en mia nova patrio, kiun mi forte amas. Ho, la libereco estas la plej bela afero en la mondo!

A.

Ĉu mi petu politikan azilon en Varsovio ?

Mi ne scias, ĉu Emil Egner kutimas prediki al stultuloj aŭ ŝafemuloj tion, kion li nomas socialismo, sed almenaŭ du asertoj de lia teksto pri "nia angorplena socio" havas neniun racian signifon :

* Kiel mi povus scii, ĉu dum mia ĵusa restado en Prago, la sekreta polico sekvis min ? Se mi tion sciis, ĝi ne plu estus sekreta! Kion mi scias, tio estas, ke pragaj esperantistoj ne povas organizi aprilan feston sen iu permeso de la ĉefaj aŭtoritatoj, kies neceso neniu kapablis komprenigi al mia okcidenta menso.

* "Ĉe ni jam ekzistas ja multe da milionuloj". Kiun valuton tiom da ĉeĥoj, slovakoj kaj moravoj posedas milionope, tion Emil Egner ne precizigas al ni. Okcidente estas pli facile posedi milionon da italaj liroj, ol milionon da usonaj dolaroj. Mi persone preferas posedi 2 milionojn da francaj centimoj, per kiuj mi en Prago multon povus aĉeti, ol du milionojn da ĉeĥa-slovakaj kronoj, kiuj, eĉ se ili estus eksporteblaj, havus en Strasburgo simple nenioman valoron.

Ĉar mi estas kompatinda franca laboristino hontinde ekspluatata de la franca kaj internacia kapitalismo, mi en Prago demandis min, ĉu mi petu azilon de la ĉeĥa socialisma respubliko. Sed, demandinte, kiom alta estas kutima ĉeĥa salajro, kaj mem rigardante en pragaj magazenoj, kiom kostas diversaj varoj, mi kalkulis, ke franca ekspluatata laboristo, kiu gajnas la minimuman salajron garantiatan de niaj socialaj leĝoj, havas vivnivelon duoble pli altan, ol havas ĉeĥa laboristo, kiu, en respubliko, kie ne ekzistas ekspluatado de homo fare de homo, laboras nur por la bono de la laborista klaso kaj de ĝiaj oficialaj reprezentantoj. Ĉar mi estas monstre egoisma, mi revenis al mia ekspluatejo.

Ĉar la franca respubliko permesas al siaj civitanoj iri ien ajn en la mondo (kondiĉe, ke la vojaĝon ili povu pagi), mi intencas plibonigi mian regadon de la pola lingvo per iom da restado en Varsovio. Ankaŭ tie mi povus peti azilon, kvankam, en mia persona kazo, tio aspektus kiel stranga paradokso. Sed, ĉar li havas personan sperton pri tio, mi emas kredi la aserton de mia edzo, ke franca senlaborulo en urbo Metz havas vivnivelon egalan kiel tiun de varsovia laboristo, al kiu la pola popola respubliko donan normalan polan salajron.

Jakelino

PRI KVADRATURO

La tuta homa scienco estas ja en arkivoj. Tiu, kiu volas ĉion inventi denove, riskas erari. La kvadraturado estas perfekte solvita problemo kiel bone klarigis Valo. Ne ekzistas tabuo pri alia solvo sed fakta (fizika) neebleco. Iom da literaturo ne faras veron el eraro.

P.M.G.

KIEN IRI ĈI-JARE ?

Jen organizoj, kiuj proponas al ni ferilokojn malmulte kostajn, tamen tre agrablajn :

* La Internacia Universitato de la Paco. Petu informojn de TUTMONDE, Apartat 313, TERRASSA, Hispanio.

* Esperanto Pau-Adour, Centre Social La Pépinière, Av. R. Schuman, F-64000 PAU (Francio)

* La Kvin Petaloj. Petu informojn de Suzanne BOURESSE, 15 rue Morel-Payen, F 10000 TROYES.

Tio estas tute senpaga propagando.

Laŭlo

Ne ĉiu "materialo" povis aperi en tiu ĉi numero ! Ĝis la venonta, espereble **duobla**, fine de junio !

Kribo